

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 6

Novembro/Decembro 1969

Nia 13a Jarkunveno

Inter la 17a kaj 19a de oktobro 1969 aranĝis la „Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA) sian 13an jarkunvenon en Augsburg. Partoprenis 84 germanaj esperantistaj fervojistoj kaj gastoj el 6 aliaj landoj. La bone organizitaj aranĝoj, tre atentitaj de la fervoja administracio kaj socialorganizo, de la sindikatoj kaj gazetaro, pasis en bona harmonio.

Estas jam tradicio de dektri jaroj, ke la membroj de nia asocio renkontiĝas unufoje poĵare en la kadro de la Fervoja Socialorganizo. Ĉiujare invitas alia distrikto. En 1969 gastigis la GEFA-anojn la vaste konata „Fugger-urbo“. La kongresanojn alvenintajn en la stacidomo informis tabulo, ke la „akceptejoj“ troviĝas en la DGB-sindikatejo Schätzlerstrato 13. Jam oni rigardis la grandan flagon de GEFA. Afablaj LKK-anoj, je la kapo kolego „Esperanto-Schmid“, bonvenigis kaj disdonis la kongresdokumentojn kaj prospektojn de la gastiganta urbo. La loĝigon prizorgis la urba trafikoficejo.

Gazetara konferenco

Vendredon la 17an de oktobro okazis la gazetara konferenco. Partoprenis ĵurnalistoj de du gazetoj, nome „Augsburger Allgemeine“ kaj „Süddeutsche Zeitung“ kaj ankaŭ reprezentanto de la bavara radiostacio, kiu raportas samtempe por „Städtisches Amtsblatt“. La konferenco daŭris pli ol unu horon. La ĵurnalistoj montris intereson kaj raportis ne malfavore; parte ili ĉeestis ankaŭ la aliajn aranĝojn.

Estrarkunsido kaj laborrondo

Vendredon vespere la estraranoj kaj la komisiitoj por apartaj taskoj preparolis la bone preparitan tagordon por la venonta tago. Sabaton, je la 14a horo GEFA-prezidanto Brandenburg salutis

s-ron Mäntele, reprezentanton el la ĉefestraro de la Fervoja Socialorganizo, la estraranojn, la komisiitojn por apartaj taskoj, la distrikt-komisiitojn — inter ili tri novajn kolegojn — kaj kiel gastojn gesinjorojn Gimelli (Italio). Mankis nia kolego Doliwa, komisiito por junularaferejoj. D. forlasis la fervojan deĵoron. Kiel sekvanto agadas Klaus Hegenberg, distrikto Wuppertal. S-ro d-ro Lang raportis pri la procedo de Esperanto-ekzamenoj kaj pri la statuto de la Germana Esperanta-Instituto. Por la ekzameno pri „lingva kapableco“ necesas minimume tri personoj. Ĉar en Augsburg nur du kandidatoj estis pretaj pruvi siajn lingvosciojn, ne eblis fari la oficialan ekzamenon, kvankam GEFA disponas pri propra ekzamen-komisiono sub la gvidado de d-ro Lang. (Bulteno raportos en alia numero detale pri la ŝanĝitaj ekzamen-reguloj.)

Urb-vidada promenado

Sabaton, matene kaj posttagmeze ankaŭ esperantlingve por niaj eksterlandaj gastoj, interesitaj partoprenintoj estis gvidataj tra la antikva kaj romantika kvartalo. Specialaĵo estas la katedralo parte en gotika kaj romanika stiloj kun kapelo barokstila; sur la katedralplaco skulptaĵoj el la romana epoko. La mondkonata „Fuggerei“, la unua sociala loĝkonstruado el la dekkvina jarcento, detruita dum la lasta mondmilito, novkonstruita dum la postmilitaj jaroj, vekis grandan intereson. La tombejon de la Fugger-dinastio trovis la vizitintoj en la malnova honorinda sankta Anna-preĝejo.

Festvespero en Moritz-salonego

La kulmino de la tuta jarkunveno sendube estis la Esperanto-solenajo sabaton vespere. Kiel gastoj ĉeestis la sinjoroj:

Dipl. Ing. Doll, vicprezidanto de la distrikto Augsburg,
 BOR Brand, distriktestraro de BSW,
 BAMtm Mäntele, ĉefestrarmembro de BSW,
 Baumeister kaj Schmitt de BSW distrikto Augsburg,
 MdB Ott, elektodistrikto Augsburg (urbo),
 MdB Kohlberger, elektodistrikto Augsburg (departemento),
 Ammer, DGB-estro de departemento Augsburg,
 Schalmey por GdED, distriktestro Loder, ĉefestrarmembro de GDBA,
 Zehnder, estro de GDL-sindikato, BAMtm Gießner, prezidanto de IFEF, Kunze por LEA (germ.) kaj SAT, de Sutter por Belgio, Bernier por Francio, Gimelli por Italio, Srediĉ por Jugoslavio, Krogstie por Norvegio, Walder por Svislando kaj sekretario Pickel por GEA.

La dignan kadron kreis la fervoja arĉorkestro sub sia estro Strobl. Post la oficiala parto ludis la dancorkestro Zenger preskaŭ senlace ĝis 1,10 h.

Solenajo

La dimanĉa mateno kunigis la kolegojn kaj gastojn por specifa programo. Arĉorkestro de la konservatorio Augsburg, nia konata samideanino Anni Wiesmann el Grafenau kaj operkantisto Emanuel, urba teatro Augsburg, prezentis bonan muzi-

kon resp. kantadojn en solena sfero, i. a. partojn el Bajazzo kaj Figaro.

Studkonsilisto Rößler el Speyer per bonegaj recitaĵoj ligis kaj akcentis la muzik- kaj kantoprezentojn. La festparolado de IFEF-prezidanto Joachim Gießner okaze la 60jaran ekziston de internacia fervojista esperantista federacio finiĝis kun la sekvantaj konkludoj:

1. Daŭre pligrandigi la membronombrojn precipe inter la junularo.
2. Nepre ne kaŝi sin en „verdstela rondo“, sed enpenetri en la rondojn de neesperantistoj.
3. Unuavice serioze plenumi la deĵorajn taskojn kaj duavice same serioze reprezenti nian aferon.
4. Vigle agi sur landa kaj loka niveloj.
5. Vigle partopreni en la komuna taskaro de IFEF, do akurate sekvi la IFEF-laborplanon.

Lia deziro al IFEF „Travivu la sepan jardekon ankoraŭ pli brila!“ La adiaŭaj vortoj de la GEFA-prezidanto finis la unuan parton. Film- kaj diapozitivprezento el la internaciaj fervojistaj kongresoj, montritaj de niaj kolegoj Barnickel kaj Gießner ilustre kompletigis tiun bonegan matenon. Komuna tagmanĝo lastan fojon kunigis la kongresanojn. Oni adiaŭis konvinkite, ke la 13a jarkunveno de GEFA estis plena sukceso dank' al la laŭdindaj preparoj de estraro kaj LKK. Dankon al ĉiuj kaj ĝis revido en Darmstadt inter la 9a kaj 11a de oktobro 1970.

W. G.

Nia asocio en 1969

La organiza jaro inter la jarkunvenoj okt. 1968 — okt. 1969

Post nia 12-a Jarkunveno en Neustadt la estraro en nova konsisto kontinue daŭrigis siajn funkciojn. Pri varbado, instruo, klerigado kaj turismo, evoluis novaj ideoj, kontaktoj kaj kunlaboroj. Generale nia serioza faklaboro renkontas simpatian, kaj agnoskon. Dezirinde, ke ĉiu individua membro ekkonu la momentan unikan ŝancon, por solidigo de nia bona reputacio. Ĝi devas ne resti efemera sukceseto, kiun ni nur konstatas kun aprobo. Kvankam unuflan-

ke ĝojigas la intereso de grandaj organizaĵoj, fakuloj kaj reprezentantoj de gravaj administracioj, tamen aliflanke minacas ankoraŭ la stagnado de la membronombro. Ni ne kontentiĝas per la konsolo, ke en aliaj kulturaj organizaĵoj oni observas tute similajn signojn. Tamen ne necesas pesimisme orakoli pri la estonto de la Esperanto-movado, ĉar konsidere nian malgrandan membron, la rezultoj atingitaj estas konsiderindaj. Sed ankaŭ ne eblas riprozi sur

laŭroj. Ĝuste tial, ke nia nombro estas malgranda kaj ke la perspektivo ŝajnas ne esperiga, ni devas almenaŭ mobilizi ĉiujn internajn fortojn kaj kapablojn, kiujn eblas ekspluati **sen kroma ŝarĝo** de niaj aktivuloj. Tio ne estas cedo antaŭ nefavora situacio, sed nepra premo, kies plenumo preparas fekundan kampon por nova rikolto.

Organizaj aferoj

Tri novaj distrikt-komisiitoj ekoficis dum la pasinta

laborperiodo, nome: k-go Schmid por Augsburg, k-go Gißibl por München, k-go Schrapp por Münster. Vakis la posteno de komisiito por junularaj aferoj post ekziĝo de k-go Doliwa el la fervoja deĵoro. Ek de la 13-a jarkunveno kolego Klaus Hegenberg el la distrikto Wuppertal transprenis tiun taskon. Kiel nova komitatano de IFEF funkcias kolego Kiefer, BD Stuttgart, de post jarfino 1969 kun plena voĉdonrajto kiel kvina germana komitatano.

Ni funebras pri tri fidelaj kunlaborantoj, kiujn dum tiu jaro la morto prenis el inter niaj vjoj. Kun danko pro ilia fervoro kaj amikeco ni memoras la kunfondinton de GEFA C. J. Rummel, kolegon Wilhelm Kirschgens el distrikto Essen, kaj nian membron Anton Ballauer, distrikto Wuppertal. Ili ripozu en paco!

Rilatoj kaj kontaktoj

Kiel reprezentanto de la BSW-ĉefestraro kaj ties respondeculo pri kulturaj aferoj s-ro Mäntele partoprenis kun intereso niajn kunvenojn. Kolego Gießner kiel antaŭe en la funkcio de ĉefkomisiito reprezentas nian asocion en la ĉefestraro de la Fervoja Sociala Organizo. Post la fervojaj sindikatoj GdED, GDBA nun ankaŭ GDL esprimis sian simpatian por niaj klopodoj per korporacia membriĝo al GEFA. Denove ĉefe la individua kontakto, persona klopodo kaj netruda persisto atingis tiun sukceson.

Amikajn rilatojn kun la franca asocio atestas la reciprokaj vizitoj en la respektivaj jarkunvenoj. En la kadro de la unua franca-germana kongreso paskon

en Strasburgo FFEA kaj GEFA aranĝis komunan kunvenon kun interesa programo (v. Bultenon 3/69), kiun partoprenis 75 personoj. La jarkunveno de la nederlanda asocio FERN diskutis en Dordrecht kun la reprezentanto de GEFA i. a. planojn pri reciprokaj invitoj al limlandaj renkontiĝoj kaj komunajn problemojn de varbado kaj instruado.

IFEF-Kongreso

68 anoj de GEFA partoprenis la internacian fervojistan kongreson en Avignon, (v. Bultenon 4/69 kaj LIF 3/69). Nia kolego Barnickel akceptis la taskon gvidi la statut-komisionon. Por la 22-a kongreso en Rimini karavana vojaĝo k. s. ne estas planita.

Faka laboro

La fakto, ke estraranoj de GEFA aktivis en la fervojfakaj komisionoj de IFEF ne restas sen reflektado al nia landa asocio. La bonega fakprelego de Avignon aperis resume en Bulteno 4/69 germanlingve. Kiel rezulto de team-laboro baldaŭ post la kongreso povis aperi la 50-paĝa, bone presita ilustrita broŝuro „Schnellverkehr“, ekzakta traduko de la kongresprelego, kiu en tiu vesto trovis la intereson de specialistoj, fervojaj lernejoj, fakorganizoj kaj -redakcioj en la germanlingva teritorio. La bedaŭrinde nur minimumaj individuaj petoj montris, ke multaj ne ekkonis la favoran okazon por frape demonstri tiun praktikadon de la Internacia Lingvo al pli vastaj rondoj de fake interesitaj fervojistoj. La dokumenta servo de DB denove envicigis nian fakprelegon en sian kolekton.

Informado

Sekve de celkonscia informado ankaŭ dum la pasinta laborperiodo la gazetara raportis favore pri la Internacia Lingvo ĝenerale kaj pri niaj aranĝoj speciale; i. a. en Socialblatt, GDBA- kaj GdED-organoj aperis raportoj pri Neustadt kaj Avignon. „Signal“, funkciula organo de GdED, publicis plurpaĝan artikolon de koleginio Kruse pri la 60-jara historio de IFEF. La ĵurnaloj de Palatino en pluraj eldonoj skribis pri nia 12-a Jarkunveno. Tradicie kaj programe ankaŭ en Augsburg okazis gazetara konferenco. Plej ofte la kontentiga informado al la publiko originas el la iniciato de nur unu aktivulo, kiu kapablas plaĉe frizi niajn sciigojn kaj lerte kombini ilin kun lokaj intereso. Atingis nin tiaj publikigoj i. a. el Stuttgart, Osnabrück, Herzberg, Laupheim, Solingen, Kronach.

Bulteno

La ĝenerala evoluo de la prezoj influis ankaŭ la kostojn de presado. Pli-malpli regule la redaktoro ricevis raportojn kaj sciigojn el 9 distriktoj, sume el 16 urboj. La novaj rubrikoj „Distriktaj Komisiitoj“ kaj „Faklingva anguleto“ vekis pozitivan eĥon.

Instruo kaj ekzamenoj

La emerita kolego Jäger, komisiito pri instruado, esploris la eblojn, utiligi programitan kurson por niaj celoj. Krome li daŭrigas sian laboron en la kadro de DGB-Briefschule. Nia ekzamen-komisiono nepre bezonas novajn kaj junajn kunlaborantojn, ĉar ĉi-tempe la nefunkcio de nur unu komisaro, pro kiu ajn motivo, jam malebligas plenumi la komision de la Esperanto-Instituto.

Varbado

En kelkaj distriktoj niaj aktivaj kunlaborantoj organizis informajn varbkunvenojn. Gustateme por aŭtuna varbkampanjo la distrikt-komisiitoj ricevis novajn afiŝojn kun pli moderna aspekto. Unuaj kontaktoj kun ATC (fervojistaturismo) kaj IOE (oficialigo de Esp.) promesas reciproke profitigon de la respektivaj rimedoj. Plano pri ferio-kursoj atingis ĝis

nun nur la stadion de enketo; ATC salutis la proponon de komuna agado ankaŭ sur tiu ĉi kampo.

En la jaro, kiun ni kun rimarkindaj sukcesoj kaj kun kelkaj neĝojigaj spertoj nun trapasis, GEFA proksimiĝis je plua paso al la celita nova, moderna koncepto pri la praktikado de nia Internacia Lingvo. Multflankajn variajn distrojn ofertas potenca amuzindustrio. Tamen, tion

provis fidindaj testoj de GEJ k. a., ekzistas atentinda intereso por Esperanto.

Tamen niaj idealoj trovis favoron kaj simpatiojn de grandaj sindikataj organizoj. Tamen GEFA povas firme konfidi sian estontecon al granda nombro da fidelaj kunlaborantoj, kiuj estas konvinkitaj pri la kultura valoro de nia Internacia Lingvo.

Willi Brandenburg

Herbsttreffen in Augsburg

Welcher Anziehungskraft sich die schon traditionelle Jahresversammlung erfreut, bewies die zahlreiche Beteiligung unserer Mitglieder und der Teilnahme ausländischer Kollegen aus Belgien, Frankreich, Italien, Jugoslawien, Norwegen und der Schweiz.

In zwei Arbeitssitzungen beschäftigten sich Vorstand, Bezirksbeauftragte und der Vertreter des BSW-Hauptvorstandes mit zahlreichen Fragen unserer Vereinigung, deren 850 Mitglieder im gesamten Bereich der DB Dienst leisten. Die im Vorjahr erarbeiteten Vorstellungen über neuzeitliche Werbung und Esperanto-Unterricht wurden vom Vorstand kontinuierlich in die Praxis umgesetzt. Der Mittelpunkt unserer Bemühungen sind die Ausarbeitung von Fachvorträgen und -beiträgen aus dem internationalen Eisenbahngeschehen. Große Organisationen, Fachleute und Repräsentanten wichtiger Ministerien haben sich unserer Ausarbeitungen für ihre Zwecke bedient und die uneingeschränkte Verwendbarkeit der internationalen Sprache anerkannt.

Im abgelaufenen Berichtszeitraum wurden die Bezirke Augsburg, München und Münster mit neuen Beauftragten besetzt. Ebenfalls wechselte der Beauftragte für Jugendangelegenheiten seinen Posten. Ab 1970 wird der deutsche Landesverband, entsprechend seiner Mitgliederzahl, bei den Tagungen des internationalen Eisenbahner-Verbandes (1970 in Rimini/Italien) mit 5 stimmberechtigten Mitgliedern in den Arbeitssitzungen vertreten sein. Der diesjährige IFEF-Kongreß in Avignon/Frankreich wurde von 68 deutschen Teilnehmern besucht. Der im Rahmen dieses Kongresses vorgetragene Fachvortrag „Schnellverkehr“ — eine Zusammenfas-

sung erschien in unserem Mitteilungsblatt 4/69 — wurde als Ergebnis einer modernen Teamarbeit in deutscher Sprache veröffentlicht. Die 50seitige illustrierte Broschüre ist eine exakte Übersetzung der Esperanto-Vorlesung. Das Interesse der Spezialisten, der Eisenbahnfachschulen, der Fachorganisationen und -redaktionen des deutschen Sprachbereichs ist beachtenswert.

Einen Überblick über die historische Stadt vermittelte das Verkehrsamt den Teilnehmern dieser Veranstaltung durch eine zweistündige Stadtführung — für unsere ausländischen Gäste in Esperanto. Wie bekannt, verdankt Augsburg seine Gründung dem römischen Kaiser Augustus und seine Entwicklung der Lage am Schnittpunkt der ehemals wichtigsten Verkehrsverbindung des Kontinents. Im 13. Jahrhundert erreichten die Bürger der alten Bischofsstadt die Reichsfreiheit. Die geldmächtigen Fugger und die seefahrenden Welser erhoben Augsburg zur Weltstadt, zur Stadt der Kaiser und Reichstage, zum Schaffungsort berühmter Maler, Bildhauer, Musiker und Baumeister.

Im Rahmen des Fest- und Begrüßungsabends begrüßte der Vorsitzende der „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten“, Willi Brandenburg, zahlreiche Ehrengäste, an ihrer Spitze den amtierenden Präsidenten der BD Augsburg, Herrn VPr Dipl. Ing Doll und den 1. Vorsitzenden des BSW-Bezirksvorstandes, Herrn BOR Brand. Der DGB Kreis Augsburg wurde durch seinen Vorsitzenden Ammer vertreten. Die Gewerkschaften der DB repräsentierten die Kollegen Schalmey — GdED, Loder — GDBA — und Zehnder — GDL. Die Bundestagsabgeordneten Kohlberger und Ott (Wahl-

kreise Augsburg Land bzw. Stadt) vertreten ihre Parteien. Die Gäste aus 6 Landesverbänden wurden besonders herzlich begrüßt. Mit ihrer Grußadresse — teilweise in formvollendetem Esperanto — brachten die Gäste ihre Verbundenheit mit der Internationalen Sprache zum Ausdruck. Eine besondere Ehrung erfuhr der Senior unserer Vereinigung, „Opa“ Bulla, Recklinghausen, der am 1. 10. 1969 sein 85. Lebensjahr vollendete. B. beteiligt sich an fast allen Veranstaltungen unserer Vereinigung im In- und Ausland. Einen nachhaltigen Eindruck hinterließen Solodarbietungen und die musikalische Umrahmung durch das Eisenbahner-Streichorchester Augsburg. Im Rahmen einer Sonntags-Matinee hielt der Verbandsvorsitzende Joachim Gießner einen Festvortrag zum 60jährigen Bestehen des Internationalen Eisenbahner-Esperantisten-Verbandes. Film- und Lichtbildervorführungen aus den internationalen Eisenbahner-Esperanto-Kongressen weckten zahlreiche Erinnerungen und schafften den Wunsch auch den nächstjährigen Kongreß in Rimini zu besuchen. Die BD Augsburg hatte dieser Veranstaltung die Titelseite eines Amtsblattes ge-


widmet und auch im Pressedienst Verlautbarungen herausgebracht. Hinzu kam das permanent schöne herbstliche Wetter und die Anziehungskraft die Augsburg auf jeden Besucher ausübt. Alle Faktoren haben dazu beigetragen, daß jeder Besucher auf seine Kosten kam. Die bereits bei der Pressebesprechung anwesenden Berichterstatter der „Augsburger Allgemeine“, und „Süddeutsche Zeitung“, sowie der Vertreter des Bayerischen Rundfunks, gleichzeitig für das „Städtische Amtsblatt“ berichteten positiv über unsere Arbeit und den Tagungsverlauf unserer Veranstaltung. Den Mitarbeitern des BSW-Bezirk Augsburg — den Herren BOR Brand, Baumeister und Schmitt gilt unser herzlicher Dank für die zum Erfolg führenden Vorarbeiten. Besonderer Dank gilt dem Bezirksbeauftragten Hermann Schmid und seinen Mitarbeitern für alle Mühe, die für die erfolgreiche Durchführung der Jahresversammlung erforderlich waren.

Zur gleichen Zeit wurde eine Vorstandssitzung des Verbandes der Internationalen Eisenbahner-Esperantisten durchgeführt. **W. G.**

Alta honorigo por la fondinto de FISAIC

Nome de la prezidanto de la Federacia Respubliko Germanio, el la manoj de la germana ambasadoro en Parizo, ricevis Dr. Marcel Mollion, la fondinto, unua ĝeneralprezidanto kaj nun honora ĝeneralprezidanto de FISAIC la „Bundesverdienstkreuz 1. Klasse“ de FRG. La altranga honorigo estas laŭdo por la grandaj meritoj akiritaj per la persona klopodo rilate la kooperadon de la libertemp-organizaĵoj fervojistaj el 18 eŭropaj landoj kaj Israelo.

La nuna ĝeneralprezidanto de FISAIC, Dr. Schlessler, Luxemburg, kaj la ĝeneralsekretario, Dr. Kühne, Frankfurt/Main, gratulis d-ron Mollion la 10an de juni por la 81a naskiĝtago nome de ĉiuj landaj ligoj kaj samtempe ankaŭ pro



Marcel Mollion

la ordeno. GEFA volonte memoras ĉiam sian malnovan kaj sinceran amikon, kiu partoprenis multajn IFEF-kongresojn en diversaj landoj. Korajn naskiĝsalutojn kaj gratulon pro la honorigo flanke de nia registaro. **GEFA-estraro kaj membraro**

Ni gratulas

al Per Johan Krogstie pro lia honora promocio „Kavaliro duagrada de la ordeno pro merito“. La norvega registaro honorigis lian laboron por Esperanto. Inter alie li estis la „motoro“ por la nomigo de Esperantostratoj en Norvegio (vidu: Bulteno 5/69), por la neforgesebla IFEF-kongreso en Hamar kaj multaj naciaj kongresoj.

Ankaŭ d-ro István Bácskai, gvidanto de la Fervojista Faksekcio de Hungara Esperanto-Asocio, post fakaj kaj ŝtataj distingoj (honorigoj: „Meritplena fervojisto“, „Elstara fervojisto“, kaj ricevinto de la ordeno „Por la socialisma kulturo“) nun ricevis ŝtatan honorigon: La „Labor-ordenon“.

**Nome de la GEFA-estraro
la redaktoro**

Turismo

Internacia feriosemajno en la Nigra Arbaro

De 1. ĝis 7. aŭgusto 1970 (post la SAT-kongreso en Augsburg) okazos en la TAN-domo Kniebis, proksime de la urbo Freudensstadt, internacia feriosemajno, organizita de la Turista Asocio la Naturamikoj, Esperanto-fako. Oni havos ankaŭ la eblecon resti pli longe en la domo. Detalojn pri prezoj, ekskursoj, ktp. sciigas Gerhard Kunze, 7291 Wittlensweiler, Halden 333.

Trilanda Esperanto-kongreso

Belga, nederlanda kaj germana Esperanto-asocioj organizas sian unuan komunan kongreson paskon 1970 en la limurbo Aachen. Inter la multifaceta programo okazos ankaŭ fervojista kunveno, kies programon ni ĝustatempe konigos. Pro aliĝiloj, hotel-mendiloj ktp. oni turnu sin al: Trilanda Esperanto-kongreso, 51 Aachen, Karl-Marx-Allee 172.

Internacia renkontiĝo de esperantistoj - naturamikoj

Je la 18a ĝis 28a de julio 1970 organizos IREN internacian renkontiĝon en la kampadejo ĉe Abaliget/Hungario. Kosto ĉ 900 fl. Adreso por aliĝo: Organiza komitato Pécs 1. pf 2. (Hungario)

El la grupoj

Nürnberg/Kronach

Ek de kvar jaroj aranĝis la popolatlirnejo Kronach Esperanto-kursojn. Ankaŭ 1969/70 okazos kursojn por komencantoj kaj progre-

sintoj. Unuan fojon ek de aŭtuno 1969 instruas studkonsilantaro Grötzner studrondon je la Kaspar-Zeuß-Gymnasium. Post la oficiala parto ĉiam merkrede estas grupvespero. Ankaŭ fervojistoj el urbo kaj ĉirkaŭaĵo aktive kunlaboras.

Mitteilung des Vorstandes

In Abwandlung früherer Gepflogenheiten werden die Anmeldungen zum 22. IFEF-Kongreß in Rimini (16. — 22. 6. 1970) vom GEFA-Sekretär Otto Rösemann, GV Osnabrück, gesammelt und weitergereicht. Zahlungen (derzeitiger Wechselkurs 1000 L = 6 DM) sind auf das Konto der GEFA/IFEF im BSW Frankfurt/Main bei der Eisenbahn Spar- und Darlehenskasse Frankfurt/Main, Konto 953 729 zu leisten. Anmeldevordrucke sind bei

den Bezirksbeauftragten erhältlich.


Wuppertal Zamenhof-Abend und Jahresversammlung

finden am Sonntag, dem 7. 12. 1969, um 17 Uhr, in Schwelm, Gaststätte Ellinghaus, Kölner Str. 29, statt. Als Gäste werden 2 japanische Esperantisten, die sich auf einem Europatrip befinden, erwartet. Die Mitglieder des Bezirks werden hierzu herzlich eingeladen.

Korespondedeziroj:

Mirko Zlatkovic, Maršala Tita 17, Lapovo (Jugoslavio) deziras korespondi kun germanaj kolegoj. Václav Ružička, Dečín VI, Kraenstudenecká 731/69 (Ĉeĥoslovakio) serĉas korespondanton, kun kiu li povas interŝanĝi fotojn de lokomotivoj aŭ aliaj fervojmotivoj.

Redaktfino por 1970: 15. 1.; 25. 3.; 10. 6.; 20. 8. kaj 10. 11.



Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras goĝigan Kristnaskon kaj sukcesplenan Novan Jaron
Germana Esperanto Fervojista Asocio

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck/preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.